

ESPERANTO

TRIUMFONTA

Aperas semajne, kun monataj aldonoj „Revue“ kaj „Internacia Komercio“

5000 abonantojn bezonas ET.
3500 ĝi havas.
Do helpu al ni atingi
5000

Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norte, Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto, București (Rum.)
Teo Jung, Köln (Kolonio)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administrejo:

Horrem bei Köln, Germ.
Postoficejo Köln 7065, por Teo Jung, Horrem.

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Literatura red.: Zanon.

Abonon ni akceptas ne por fik-ita tempo (jaro, monatoj) sed por nombro de ET-numerol. Oni sendu lun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpigo de la sumo. Pri finiĝinta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. „Revue“ kaj „Internacia Komercio“ senpage por ET-abonantoj.

Prezo de unu numero por la landoj kun kolonioj:

Argent. 0.15 Peso	Ĉeĥal. 1.20 Kr.	Germana 600 Mk.	Kanada 0.06 Dol.	Portug. 0.60 Esk.
Aŝtra 1800 Kr.	Estona —	(Abonu nur ĉe la poŝto)	Latva —	Rumana 4 Leo
Belga 0.65 Fk.	Finna 1.20 Fmk.	Ital. 0.80 Lit.	Litova 30 Cd.	Rusa 200 Gmk.
Brazila 0.400 Mr.	Francia 0.60 Fk.	Japana 0.10 Jen.	Ned. 0.15 Hfl.	Sveda 0.24 Kr.
Brita 3/4 P.	Hispana 0.30 Pes.	Jugosl. 2.50 Din.	Norvega 0.50 Kr.	Svia 0.30 Fk.
Bulgara 4 Levul	Hungara 60 Kr.	Nenomiĝitaj landoj pagu provizore egalvaloron de 0.20 sv. fk. aŭ 0.04 Dol.	Pola 800 Mk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Por Adressaĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto.

Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 svisan frankon (aŭ ĉe an'aŭpago 200 gmk.); rabato laŭ interkonsento. Por „Internacia Komercio“ kaj specialaj numeroj speciali prezo.

N-o 131 :-: Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 8. IV. 23.

Kiam ni fine venkos?

Sendube, ĉiu Esperantisto ofte pripensas, kiam ni fine estos tiom multnombraj, ke ni havos utilon el nia lingvo, kiam nia pena propagand-laboro estos finita. Ne parolante pri skeptikuloj, kiuj dubas, ĉu ni entute iam venkos, estas multaj samideanoj, kiuj nian triumforon forŝovas en tre, tre malproksiman estontecon. Ne tiel pensis nia fama poeto kaj matematikisto, profesoro A. Dom-browski, kiu fine de pasinta jarcento kantis en sia arda „Nova Kanto“, ke dum nuna jarcento Esperanto estos parolata en ĉiuj lokoj de kvin kontinentoj. Ĉu tio estis nur profeta intuicio de poeto, aŭ eble sur matematikaj pri kalkuloj bazita antaŭvido? Entute, ĉu matematiko povas nin helpi por respondi la supremitan demandon?

Ĉiu el ni certe rememoras la en gimnazio solvitajn problemojn pri plimultiĝo de loĝantaro en iu lando, pri kresko de arbaroj, mono ktp. Preninte statistikon pri loĝantarnombro en iu lando por pli longa tempo, ni trovas mezan jaran plimultiĝprocenton, kaj havante ĝin, ni jam povas proksimume ekalkuli, kiom da loĝantoj havos la koncerna lando post kelkdek jaroj. Kiel ne fari la samon rilate al nombro de Esperantistoj?

La koncerna formulo estas

$$A = a \left(1 + \frac{p}{100}\right)^t$$

k. e A signifas la serĉatan loĝantarnombro, a = la nunan, p = procenton, t = tempon.

Aplikante tiun formulon je solvo de nia problemo ni demandas nin, post kiom da jaroj ni havos miliardon da Esperantistoj. Se antaŭ 35 jaroj estis nur 1 Esperantisto — la Majstro mem — kaj se nun estas en la mondo nur 10000 vera Esperantistoj (cifero certe tro malalta), tiam

$$10000 = 1 \left(1 + \frac{p}{100}\right)^{35}$$

Trovinte el tiu formulo, ke Esperantistoj jare plimultiĝas je 30,1 procentoj, ni povas skribi novan ekvacion

$$100000000 = 10000 \left(1,301\right)^t$$

el kiu ni trovas, ke t = 43,75 jaroj. Do, post 44 jaroj, kalkulante de hodiaŭ, ni havos miliardon da Esperantistoj, ni estos plej granda popolo en la mondo, nia lingvo estos parolata ĉie, ni havos plej ampleksan literaturon. Tiam vere ne nur niaj nepoj, sed eĉ jam niaj infanoj nin benos.

Certe, multaj samideanoj leginte la supran ciferon, malkrede skuos la kapon. Ili ne povos

Kvin kontinentoj reprezentotaj en Nürnberg.

Laŭ informo ĵus ricevita forvojaĝos de Aŭstralio la 25-an de aprilo gesinjoroj W. I. Drummond, East Melbourne, Victoria, por partopreni la XV-an. Do, ĉiuj kvin kontinentoj estos reprezentataj en Nürnberg.

Tiu fakto evidente refutas la timojn, ke la XV-a fariĝu preskaŭ pure germana kongreso. Komprenible, oni ne povos eviti, ke grandan parton de la kongresanoj formos la germanaj samideanoj, eble la duonon, eble eĉ ankoraŭ pli multe: pro la densa loĝantaro, pro la bonaj komunikiloj kaj pro la favora stato de nia movado en Germanlando. Jam sufiĉas, se ĉiu dua aŭ eĉ nur tria samideano estus negermano, por ke la kongreso plenrajte meritu la nomon internacia. Sed la negermanoj ja povos mem favore influi la

Do, negermanaj samideanoj, forigu mem viajn timojn, plifaciligu al la L. K. K. ĝian grandegan laboron, per via tuja kaj multnombra aliĝo!

allasi, ke la venko estas tiom proksima, tiel diri, per mano atingebla.

Por esti pli certaj, faru ni alian kalkulon, supozante, ke dum pasintaj 35 jaroj la nombro de Esperantistoj alkreskis de unu nur ĝis 5000. Cifero certe trege malalta. Farante tiun supozon, ni certe trovas la plimultiĝprocenton pli malalta, kaj miliardon da Esperantistoj ni havos post 56,77 j. aŭ 57 jaroj, cifero ankaŭ ne tro timiga — niaj junaj samideanoj povas ankoraŭ ĝisvivi tiun ĝojigan por Esperantista koro tempon.

Por certeco de ĉi supra kalkulo estas necesa nur unu sola kondiĉo — ke ankaŭ en estonto Esperanto disvastiĝadu ne pli malrapide ol ĝis nun. Ĉu estas antaŭvideblaj kaŭzoj, pro kiuj en estonto Esperanto devus disvastiĝadi malpli rapide ol ĝis nun? Al mi ŝajnas, ke apenaŭ tio estas ebla, kaj jen kial: Esperanto en tempo ne oportuna — post malsukceso de Volapük, ĝin komencis propagandi sola malriĉa homo povanta doni al adeptoj de nova lingvo nek iun utilon por ĝia eklerno, nek eĉ iun literaturon, baldaŭ ĝin ekskuis skismo de ldistoj, kaj ĝian disvastiĝon haltigis la longedaŭra mondmilito. Ĉiuj ĉi malfavoraj kondiĉoj influis malpligrandige la plimultiĝprocenton. Kio ajn okazos en estonteco, Esperanto ne plu refalos en infanvindajojn, de tago al tago kun la nombro de Esperantistoj kreskas la

internaciecon de la kongreso, per tuja kaj multnombra aliĝo. Multaj eksterlandanoj nun hezitas aliĝi, atendante pliboniĝon de la politikaj cirkonstancoj; sed ili ne pripensas, ke pro tio la listo de la kongresanoj nun donas tute malĝustan imagon, montrante plejparte germanajn aliĝintojn, kaj ke per sia hezito ili kaŭzas necesajn malagrablajn al la L. K. K. Ŝajnas, ke la plimulto de la negermanaj kongresantoj intencas aliĝi nur en lasta momento. Sed tio estus neaprobinda intenco.

utilo de nia lingvo, kaj dank' al la plimultiĝanta ŭilo ankaŭ la alirpovo de Esperanto. Krome, la pro milito plimultiĝinta nombro de ŝtatoj, la tiel rapide progresanta internaciigo de tuta nia vivo, la mirakla evoluado de trafikrimedoj, kiel aviacio kaj radiotelefono, pli urĝe ol antaŭe postulas internacian lingvon. Do, kun pli multe da certeco ni povas allasi, ke la plimultiĝprocento estos pli granda ol de ni kalkulita, kaj sekve la tempo por nia finvenko pli mallonga.

Certe, kelka samideano povas diri, ke, se tia kalkulumano estas ĝusta, ĉiam kalkulinte laŭ ĝi la disvastiĝon de kristanismo aŭ de socialismo ni devus trovi, ke nun la tuta homaro devas esti kristana aŭ socialista. Tamen facile estas vidi, ke tia konkludo estas erara kaj jen kial: Unue, estas vere, ke malgraŭ tre maloportunaj trafikrimedoj en antikva mondo, malgraŭ teruraj persekutadoj kaj preskaŭ senĉesaj militoj kaj invadoj de barbaraj kristanismo tre rapide disvastiĝis en ĉiuj landoj, kien povis peneiri ĝiaj predikistoj. Azia kaj internafrika mondo ĝis antaŭ nelonge estis nealireblaj por eŭropanoj, kaj tial ne mirinde estas, ke ili ankoraŭ ne fariĝis kristanaj. Due, ni devas memori, ke Kristo mem diris, ke Lia instruado estas nur por homoj de bona volo.

Post apero de socialista manifesto pasis ĉ. 70 jaroj, kaj en ĉiuj mondpartoj jam estas miliojn itaj pugnoj volas sin jeti sur la maloportunan sklavon. La publiko sentantas, ke alvenis la momento de la solvo, eksilentas, kvazaŭ sorĉa mano subite estus ferminta ĉiujn buŝojn.

„Ĉu vi ne ordonis al mi, ke mi venu post vi ĉar vi min senharigos?“
Denova ektdoro de rido kaj aplaŭdo. Fine Garineau, la reĝisoro, malfrue, kiel ĉiam, sciiĝas pri la afero kaj krias al Perrache, la maŝinisto, ke li mallevu la kurtenon. Dek minutojn poste, kiam ĉesis la gaja bruego, oni denove ekkludis la aktan — sed ĉu ĝi restis ankoraŭ dramo? Pasis, kio pasis, oni regis sin kelkajn sekundojn, kaj denove rideksplodis iu rigardanto, eble eĉ aktoro, kaj nun provu vin reten! Ĉiuj kunridis! Pli ĝuste ĉiuj escepte Raluca, kompreneble, kiu efektive estis la plej forlasita reĝino.

Post la senharigo al la fraŭlino, la aktorino duan tagon ŝin maldungis, kaj ŝi repaciĝis eĉ kun la Blonda; nome, ĉe la provludo matena oni ja nepre traktis nur pri la vespera komedio, kaj vorto post vorto la Blonda — kiu ne estis vespere en la teatro — diris al Dragulici:
„Kompaitinda Raluca! ho, kompaitinda knabino! ke la malsagulino fuŝis al ŝi ĝuste la monologon, ŝian »bataloĉevalon«!
Raluca aŭdis tion, ŝi forgesis pri la malpacigo kaj alparolis ŝin:
„Imagu, kara, ĝuste tiun scenon, pri kies efiko mi pleje kalkulis!“
Tiamaniere ekrompiĝis la glacio, kaj la nomitaj du personoj denove fariĝis bonaj amikinoj. Tio ĉi okazis lundon matene: vendron aŭ sabaton ili interbatalis refoje, ĉar Stavreasca postulis de la direktoro rolon, kiun „kreis“ la Blonda... Sed tio ne estas ebla; ĉiu restu ĉe siaj kreaĵoj!

El la rumana originalo tradukita: Tiberio Morariu.

El la taglibro de malnova suflo.

De J. L. Caragiale*.)

La malfeliĉo de reĝino.

Vespere, ludonte, ĉiu aktorino kunportas servistino, por havi helpon ĉe l' vestado: „Kudru jen tie ĉi, ekprenu jen tie, alportu teon, aŭ petu de iu cigaron ktp. ...“

Raluca Stavreasca de kelkaj tagoj havas kun ŝi servistineton tiom ĉerman, ke la tuta aktoraro, ĉiuj maŝinistoj, lampistoj, ĉarpentistoj kaj fajrobrigadanoj ardas en fajro; ĉar laŭŝajne ĉi tie kaj tutmonde estas ja la samo, kvazaŭ ironio de l' sorto: nenio estas pli ekbrulema, ol fajrobrigadano. Kiam Stavreasca bezonas la „madmazelon“, la fraŭlino forestis por babiladi, aŭ petoladis inter la kulisoj. Iun vesperon la kompaitinda aktorino ludas la reĝinon en melodramo turplena. La kvara akto prezentas revolucion ĉe l' pordego de l' palaco. La reĝino — blokita de la popol-amaso en la palaco — envenas scenejon, kiu prezentas grandiozan akceptejon, aŭdigas kelkajn vortojn, poste eliras sur la balkonon, por vidi kio okazas sube, kie bruas la amasa furioza, kaj ŝi devas rerapidi la scenejon, pala kaj konsternita de teruro: ŝi vidis, kiel la sovaĝuloj jam liberaj de l' katenoj de sklaveco disiris ŝian filon amatan. Por efiki pli potence, la talenta artistino preparis blankan pudron por meti ĝin sur la vizagon ekstere sur la balkono. Sekvas la kvara akto: proksimiĝas jam la ensceniĝo. Raluca enmanigas al la fraŭlino la pudran skatolon kaj la speguleton, dirante tre severe:

„Fraŭlino, bonvolu veni post mi, ne foriĝu de tie ĉi, — ĉu vi komprenis? — se vi ne volas, ke mi senharigu vin!“

Alvenis la momento. De sub la balkono de l' reĝa palaco aŭdigas sovaĝa kriadado. Sur la scenejo aperas la reĝino kun vizago respuganta terurigon. Kiam ŝi enpaŝas, la tuta teatro ekridigis, kiel ĉe iu komedio. Ŝi metas la manojn sur la bruston, levas la okulojn al la ĉielo, paŝas al la lamparo kaj deklamas kun plena fervoro:

„Mia filo, la princo... kie estas la princo? Dio mia! mi antaŭsentas grandan malfeliĉon!“

Vere! la publiko ege hahaas*) kaj komencas aplaŭdi per la manoj, per piedoj, per bastonoj, — ekskuiĝas eĉ la lustrego. La reĝino perdas la ekvilibron. Komence ŝi ne scias kion pensi, tiom ŝi alkiutimis enkatentigi kaj regi la publikon per siaj belega voĉo, noblaj gestoj kaj staturo. Poste ŝi ekpensas, ke okazas intrigo, dank' al Marinjo la „Blonda“ (Constandineasca), kun kiu ŝi malamikas ĝistranciĝe. Sed la gajo de l' publiko plue kreskas: ne estas plu eble resti sur la scenejo. Tutkorpe tremante, kun animo kaptita de sensacio morigita, ŝi movas sin dekstren, por elkuri... Sin turninte por rifuĝi for de la kapturiga rigardo de centoj da mienoj grimacaj pro ridego, ... kiun ŝi ekvidas? ... la fraŭlinon. La fraŭlino staris ĉe ŝia dorso kun speguleto subbrake, kun la pudra skatolo en unu mano kaj kun pudrilko preparita en la alia, preta por apliki ĝin: de la komenco ŝi postiris ŝian malfeliĉan moŝton. Oni nun imagu, kiel uraganis la ridego de l' publiko vidanta, ke la reĝino mem malkovris la misteran kaŭzon de sia malfeliĉo.

„Kial vi estas tie ĉi, vi sentaŭgulinon?“ la reĝino alkiutigas en tragika streĉo kaj kun kunprem-

*) Sonimita vorto de l' rido.

da ili. Socialismo laŭnature povas disvastiĝi nur en parto de homaro — pli aŭ malpli granda kapitalisto neniam povas fariĝi socialisto.

Do, ĉar kristanismo kaj socialismo postulas de homo ŝanĝi sian pens- kaj kondutmanieron kaj ŝanĝi tre radikale, ofte kun multe da oferoj, ne estas mirinde, ke multaj homoj ne fariĝas kristanoj aŭ socialistoj. Kontraŭe, Esperanto altrudas al homo nenian specialan pens- kaj kondutmanieron kaj postulate nur malmultan temp-aplikon por lerno de lingvo tuj donas al homo diversspecan utilon kaj ĵu pluen, des pli multe. Kaj vere, inter Esperantistoj ni trovas kristanojn kaj kontraŭkristanojn, kapitalistojn kaj socialistojn, ŝovinistojn kaj homaranojn. Esperanto estas destinita por la tuta mondo, kaj tial al ĝi estas aplikbla la de ni uzita formulo.

Malgraŭ ĉio ĉi supre dirita certe multaj malkonfide rilatos je supra pri kalkulo, ne povante alkiutigi al la penso, ke post kompare tiom mallonga tempo la mondo estos tiom radikale ŝanĝita. Tamen rememoru ni la vivon antaŭ cent jaroj — ĉu niaj avoj povis tiam almenaŭ ŝanĝi pri hodiaŭaj vivkondiĉoj kaj formoj? Kaj nun la progreso antaŭenmarŝas per ĉiam pli rapida paŝo.

Do, fidu ni — pli junaj el ni ĝisvivos ankoraŭ la venkon de nia movado. En malproksimo ni vidos jam laardon de benita lando Esperantujo — nur ĉiuj pli forte premu ni la remilojn!

J. Maĉernis.

Realistoj — Idealistoj.

Estis en 1905. Hazardo feliĉa enmanigis al mi broŝureton pri Esperanto gramatikon enhavantan. Jam kelkajn tagojn poste ekpatis min la sorĉa influo de io granda, ideala, sankta, de ideo feliĉiga kaj benportanta. Malkaŝe mi konfeseas, ke unuamomente min malpli interesis la lingvo ol la ideo de l' verkinto kaj la perspektivo al „Nova Tempo“. Neniu persono, neniu lingvistulo detruis ĉi tiun pensaron en mi aŭ forigis mian internan gojon prilraktante pure lingve la internacian interkomprenilon. La spirito de l' ideo min regis. Ne seniluziĝinte mi daŭrigis mian okupon pri Esperanto dum kelkaj jaroj. La legado pri la deveno, pri la historio kaj la unuaj jaroj de l' ekzistado de la lingvo, la raportoj pri la unuaj kongresoj kaj la eldiroj Zamenhofaj min tute kontentigis. Kun kordoloro mi travivis la tempon de l' perŝilo (Markizo de Beaufort, 1907). Samideanojn mi ne renkontis. Io reala, vivanta forto estis ligita al mia vivo Esperantista, kaj

La unua neĝo.

De Erik H. Zetterström.

Ili ambaŭ estis tre junaj, kaj do okazis io, kio estas preskaŭ neevitebla. Sur la bela insulo tre malproksime en la maro ili sidis rigardante la maron kaj aŭskultante la plaŭdon de la ondoj frepantaj kontraŭ la rokaj. En la vasta malproksimo veturis velŝipejo al alia lando, kaj sur la ĉielo fajre brilis la steloj. Kaj ili ekrigardis ŝin, rigardis profunde en ŝiajn okulojn kaj diris:

„Evo, mi jam de longe intencis ion diri al vi, sed mi ĝin ĉiam prokrastis. Nun, kiam ĉi ĉirkaŭ ni estas tiel mirinde bela, kaj ekrigardante vin, mi estas denove kaptita de la penso, kiom mi vin amas kaj kiom vi signifas por mi. Diru al mi, ĉu vi ne ankaŭ min lomete remas?“

Al tio ŝi respondis nentem, sed kilnis sian kapon kontraŭ lia ŝultro kaj tiamaniere komprenigis lin. Nun li ekhavis ion por kio vivi. Lia koro bategis, kaj li eĉ pli forte premis sin al ŝia brusto. Ŝi estis la unua, kiun li amis, kaj li donis al ŝi la promeson, ke ŝi restu la sola.

Ambaŭ kune pasigis agrablan someron sur la ĉarma insulo. En la tagoj ili migris en la arbarojn; kaj vespere, kiam ĉie regis silento kaj trankvilo, ili remveturis en boato sur la spegule brilanta golfeto.

Kaj tiel pasis la tempo. Tagoj, semajnoj kaj monatoj malaperis, kaj fine ili devis vojaĝi al la granda urbo. Ili veturis tien per la sama ŝipo, kaj preretvurinte la larĝajn golfetojn kaj atingante la mallarĝajn, proksime al la urbo, kie la koloro de la akvo havas alian aspekton kaj la vilaĝoj fariĝas pli multiplaj belaj, li kaptis ŝian manon dirante:

*) Jon Luca Caragiale (1885—1912), unu el la plej grandaj verkistoj rumanej, eminenta kiel humoristo kaj satiristo.

precipe la sento ardanta por nia afero estigis en mi la fidelecon nekskueblan al mia tasko pionira, kiun mi plenumis sentinte. Esti funde konsciaj pri ĉi tiuj sanktaj devo kaj mislo signifas ludi la rolon de kulturportanto. Tion mi tuklare ekkonis. Ni nepre devas labori tiuse, se nia vivo, la vivo de sciencoj kaj komprenantoj, ne estos vane kaj tute senvalora. —

Vi sendube demandos: Pro kio li rakontas al mi tion? Kion li celas? — Ne multon, samideanoj, sed ion tre, tre gravan. Aŭskultu!

Dum multaj jaroj mi tramigras Esperantujon kun okuloj kaj oreloj vaste malfermitaj. Parolemulo mi ne estas, sole observanto. Multon mi vidis kaj aŭdis malindan; egoismo, ambicio, danĝera rivaleco inter konkurantoj kaj pluaj ecoj nepre evitendaj por batalanto de la paco montriĝas beaŭrinde tre ofte ĉe tiaj personoj, kiuj fiere profetantaj pretekstas „fosl nian (sian propran) sulkon“. Vi mem sufiĉe ofte plendas ekz. pri mankoj aŭ ŝanĝoj en nia organizo, pri reformoj aŭ novaj aranĝoj de la propagando ktp. Ni diskutis kaj disputas pri instruaj metodoj kaj lingvaj demandoj, ni laudas aŭ mallaudas lernolibrojn kaj ankaŭ tre ofte akcentas la fakton, ke kursoj komence havas tridek vizitantojn, post kelkaj semajnoj nur dek kvin kaj post du monatoj eĉ nur tri. Jen pruvo de manko de intereso, vi diras. Tute ne, almenaŭ ne ĉiam. Mi spertis, ke multfoje eĉ la plej lerta instruisto ne sukcesis „savi“ ĉiujn tridek, kvankam li grandpene klarigis al siaj ĝeneralantoj la gramatikon kaj forigis la akrajn rokpinetojn enmeze de la reguloj krute elstarantaj. Ili forkuras tedigitaj, forrestas nekontentigitaj, ĉar la „predikanto“ malatentis la ĉefan fakton vekti ilian interson por la granda ideo en alta grado. La ŝekaj antaŭparoloj al lernolibroj ne valoras multon. La „lernigisto“ forgesis, ke ne la lingvo sole allogas, sed ke nur tiu fariĝos favora aŭ efektiva pioniro, al kiu estas inokulita la spirito Zamenhofa. Eĉ la plej sagaca logikemulo ne estas vera Esperantisto, se lin ne regas la forta deziro aĝi en la senco de l' Mastro mortinta.

Kursestroj, entuziasmigulo la novajn adeptojn antaŭ ol ekpreni la gramatikon, rakonti al ili la vivon de Zamenhof kaj la detalajn historiojn de nia tuta movado kaj ne bombardu ilin per parkere lernitaj frazaroj banalaj. Veku en ili la konscion, ke kulturlaboro estas farata, en kiu ĉiu homo havas la devon partopreni. Ili konsciigu pri la grava tasko, kiun ili estas plenumantaj, kaj estu konvinkitaj, ke ĉiu, en kiu ekflamis la sankta fajro, ne helmenkuros post la kvara leciono forgesante reveni la venontan fojon. Ekbruligu la sanktan flamon!

Mi scias, ke multaj ekkonis ĉi tiun nepran postulon kaj agas laŭ ĝi, sed miaj spertoj rajtigas min tiel paroli al multaj, kiuj mem preskaŭ nenion scias pri tiu vera kaj plej efika maniero de propagando aŭ kiuj pro manko de konoj rilate historion ktp. de Esperanto ne estas kapablaj semli la semeron de l' kulturprogreso.

Ekzistas Esperantistoj, kiuj ridas pri „Internaj Ideo“ kaj mokas pri „Homaranismo“; ilin ni laŭnature ankaŭ bezonas, ĉar per ili helpo ni ne malatentas la pure praktikan utilon de nia afero (komerco ktp.). Jen idealistoj, jen realistoj. Ambaŭ kunigi formante unu tuton. La realistoj edukas sin mem, sed ili ne estas la vivoparta parto. La idealistoj devas esti edukataj; sen ili nia afero baldaŭ estos mortinta, ĉar ili elspiras tion, kio garantias la viveblecon de nia movado, la vivigan, vivodonantan Radiumon de l' estado.

M. Butin.

Mi devas protesti.

Ne volonte mi protestas. Mi estas pacema kaj deziras vivi en harmonio kun ĉiu homo. Mi ne volas havi malmamikojn. Sed estas konata fakto ke, kiu sukcesas, tiu estas enviata. Ne mirige do, ke ankaŭ mi havas envianojn. Se tiuj envianto ŝlosus sian envion en sia brusto

„Evo, de post nun ĉio certe aliĝos por ni. Granda bruanta urbo ne povas esti komparata al nia bela insulo, kie ni lernis ami unu la alian. Ĉerte ni neniam plu havos okazon travivi tiun feliĉan tempon kiam ni pasigis ĉe la rokoj rigardante la horizonton. Nun ĉio rigidigos kaj melankoliigos ĉirkaŭ ni.“

„Sed ni tamen ja havas unu la alian“, ŝi diris rigardante en liajn okulojn, kaj samtempe la ŝipo atingis la fumplenon havenon.

Malĝoje ili promenis sur la stratoj, kie la homamaso, la aŭtomobiloj kaj la tramveturiloj formis veran abeluĝon, kaj tiam ili rigardis la sunon, kiu estis alte sur la ĉielo. Ĝi estis la solaĵo, kio restis de la naturo, kiun li lernis ami.

Ili haltis ĉe strukturo, ili levis la ĉapelon kaj diris: „Jes, nun mi devas iri al mia oficejo, kaj vi ja devas iri al via helmo, mi supozas. Adiaŭ, mi telefonos al vi jam hodiaŭ posttagmeze.“

„Adiaŭ, malgranda Algot,“ ŝi respondis, kaj kiam ŝi rigardis lin, la okuloj malsekiĝis kaj larmoj ekfluis. Li estis prava. La nuno ne estas kiel la plifruo.

Li sonorigis posttagmeze. Estis la unua fojo, ke ili interparolas telefone, kaj, kiel strange sonis la voĉoj! Li ne havis la saman belan voĉon, kiam li havis inter la rokoj, kiam li tiam vokis ŝin. Nun ĝi sonis abrupte kaj rigide. Ĉu li eble koleras kontraŭ ŝi? En la vespero ili vizitis kinematografon, ĉar kien alie iri? Ili rigardis la prezentajn, kiu estis de la kutima speco, kaj ellinte li akompanis ŝin al la pordego, levis la ĉapelon kaj diris:

„Mi kredeble estos treege okupata dum la plej proksimaj tagoj, kaj eble mi ne povos renkonti unu la alian. Adiaŭ, eta Evo!“

kaj ne ĝenus min publike, mi povus esti tute trunkvila. Sed ĉar ili sin turnas al la publiko kaj dissemas mensogojn kaj kalumniojn pri mia persono resp. pri la ĵurnalo fondita de mi, mi ne rajtas silenti.

En la marta numero de „Svenska Arbetar-Esperantistena“ la redaktanto s-o Einar Adamson — samideano, kun kiu mi, laŭ mia scio, neniam havis iun eĉ plej malgrandan malharmonieton — publikigis sub superskribo „Fiago de redaktoro Jung en Horrem“ la konatan leteron de s-o Amort, kun ofenda komento, kaj ne antaŭe informiginte ĉe mi nek ĉe la danzigaj samideanoj pri tio, ĉu la asertoj de s-o Amort estas veraj. Kontraŭ tia agmaniero de s-o Adamson mi devas energie protesti.

Cu mi denove ripeti la tutan „klaĉon“, kiu jam delonge tudas min, ĉar mi havas pli bonon por fari ol ĉiam denove refuti la senecaĵojn de negrava eta pedagogo, kiu absolute volas paroli pri si? Ekzistas ja iuj ekscentrikaj homoj, kiuj ofendas honestulojn, kiuj fariĝas krimuloj, rabistoj aŭ eĉ mortigistoj nur por ke la mondo sin okupu pri ilia persono, por ke ilia nomo aperu en la ĵurnaloj, por ke ilia portreto ornamu la ilustritajn revuojn. Je simila maniero ŝajnas malsani amiko Amort. Kial li ĝuste min elektis sia „viktimo“, tion mi ne povas divini; eble la kaŭzo estas mia artikolo en ET n-o 76, en kiu mi malkovris — post ricevo de unua ofenda letero de Amort — lian fanfaronemon, lian troan nervecojn kaj lian malgraban emon emiksi sin en aferojn ne koncernantaj lin.

Ĉi tie nur sekvu la noto el ET n-o 90 de 25. junio 1922, kiu — por ĉiu pensanta leganto — estas eĉ multe pli ol nura kvitanco: UFA. — S-o Veterinaro N. Foss en Ufa Puŝkinskaja 77, bonvolu scigi al red. de ET, ĉu li ricevis gmk. 236. — kolektitajn por II de Danziga Esp. Asocio kaj senditajn pere de Hungerhilfskomitee en Berlin.

Tiu noto klare pravas: 1. ke mi ricevis la monon, 2. ke mi transsendis ĝin al Hungerhilfskomitee (Komitato por helpo al malsatantoj), kaj 3. ke mi komisii la komitaton sendi la monon al tiu adresato, por kiu ĝi estis speciale kolektita. Cetere, la Danziga Esp. Asocio, kiun la afero unuavece koncernas, deklaris al mi, ke ĝi neniel partoprenas la ofendojn kaj kalumniojn de sia eks-membro Amort.

Mi esperas, ke tio definitive sufiĉas, ankaŭ al s-o Adamson. Esperinde, s-o Adamson estonte estos pli sincera kaj informigos ĉe la kompetenta loko, antaŭ ol publikigi en sia revuo tiajn senecaĵojn.

Duan proteston mi devas direkti al la redaktanto de „La Progreso“, s-o Tittel.

En sia numero de januaro—februaro de tiu ĉi jaro „La Progreso“ skribas interalie:

... eble la ĉsl. Esperantistoj nuntempe estas uzantaj la servojn de germana gazeto „Esperanto Triumphanta“, kiel de sia centra organo — laŭ rekomendo kaj ekzemplo de kelkaj ĉefaj Esperantistoj.

Kaj en la marta numero de la sama revuo pseŭdonimulo B.obe, kiu ankaŭ kunlaboras ĉe ET, nomas kiel internaciajn gazetojn unu „Esperanto“, „Sennacia Revuo“, „Novaj Tempoj“ kaj „Literatura Mondo“, trifoje asertas, ke ET estas germana ĵurnalo, kaj diras, ke „ĝi povus esti rapida raportilo pri aktualiaĵoj, sed neniam gazeto (resp. ĵurnalo) aboninda por ĉi Esperantistoj“; aliloke li diras, „tiuj (t. e. „La Marto“ kaj ET) estas por germanoj, kaj liberan lokon por kroniko ili disponigas al germanoj“. Ŝajne, B.obe — kvankam estante nia kunlaboranto — neniam tralegas la „Mallongaj Esp. Sciigoj“ en ET, ĉar alie li devus scii, ke la kronikon ni disponigas al ĉiunacianoj. Se ET malmulte raportas pri ĉsl. Esp. movado, tio ne estas nia kulpulo, sed kulpo de ĉsl. samideanoj mem, ĉar ili nur malofte sendas aktualajn raportojn.

Mi ĉiam deklaris, ke ET estas nepre Internacia ĵurnalo, alie ĝi ekzistado la estas klera, neeble. Kun sia internacia tendenco ĝi povus aperi en iu ajn lando, eventuale eĉ en Ĉeĥoslovakio. Sed ĝi ja devas aperi, ĉar speciale internacia lando ankoraŭ ne ekzistas, almenaŭ ne sur Tero. Kaj sur Marso aŭ Luno mi ne povas eldoni ET, ĉar ankoraŭ ne ekzistas taŭga komunikilo kun nia terano antaŭ la planedo. Do la aserto de s-o Tittel estas eĉ ridinda. Cetere, la plej internacia lando laŭ sia geografia situo en Meza Eŭropo kaj la homoj de diversaj nacioj, kiuj nun loĝas en ĝi, nuntempe ja estas Rejnlando, kie aperas ET. Britoj, francoj, belgoj, afrikanoj (ne nur soldatoj sed ankaŭ privatuloj: komercistoj, instruistoj, turistoj, bangastoj ktp.), nederlandanoj, amerikanoj, poloj multnombro vivas ĉi tie. En la urboj de l' Rejno, en Düsseldorf, Köln, Bonn, Godesberg, Koblenz, Wiesbaden kaj aliaj urboj oni aŭdas preskaŭ ĉiujn lingvojn de la mondo. Do kion volas s-o Tittel kaj B.obe?

Refoje mi deklaras, ke mi tute ne estas kontraŭulo de naciaj Esp. gazetoj (legu miajn koncernajn artikolojn en malnovaj numeroj de ET), sed kiam pro ekonomiaj kaŭzoj iu nacia ligo elektas ET an sia oficiala organo anstataŭ neevikapabla propra organo, mi kompreneble salutis tian pruvon de konflikto, kiel ekzemple okazis en Rumanio kaj Nederlando („La Estonto Estos Nia“) kaj iam en Polujo. Se ET estas germana gazeto, tiuj negermanaj ligoj certe ne estas elektintaj ĝin sia oficiala organo.

Do, ĉesigu viajn sensencajn kalumniojn kontraŭ mia persono resp. kontraŭ la ĵurnalo fondita de mi. Mi estas konvinkita, ke mi celas kaj akcelas nur la bonon de nia movado. Se io ĉe mia sintendo aŭ ĉe ET ne plaĉas al vi, vi rajtas eldiri malkaŝe kaj sincere vian opinion, sed mi povas postuli, ke vi restu ĉe la vero kaj ne dissemu malverojn kaj kalumniojn.

Mi ne volas havi malamikojn, kaj mi malsategas personajn polemikojn; sed se iu min atakas, mi kompreneble montras miajn pikilojn kaj defendas min.

Teo Jung.

XIV-a Brita Kongreso.

La XIV-a Brita Kongreso okazos la 18. ĝis 22. majo en la bela kaj fame konata tra Britujo marborda banloko Bournemouth.

La kongreskomitato sukcesis havigi al si la altvaloran helpon de D-ro Edmond Privat el Genève. Du gravaj publikaj kunvenoj okazos vespere la 18-an kaj la 19-an de Majo, je kiuj D-ro Privat parolos. Unu el ĉi tiuj kunvenoj okazos sub la aŭspicioj de la Bournemouth Filio de la Unuigo de la Ligo de Nacioj, kaj de la ĉi tiea Esp. grupo. La urbestro bonvenos la delegitojn je la unua kunveno.

Du ekskursoj estas aranĝataj:

1. Per aŭtomobiloj tra la „Nova arbaro“, plantita de la Reĝo Vilhelmo I-a en 1079.
2. Vaporŝipe al la insulo de Wight por viziti la Kastelon de Carisbrooke, kie la Reĝo Karlo I-a estis enkarcerigata en 1646.

Dimanĉon, posttagmeze, okazos komuna temango, kaj mardon komuna tagmango.

Lundon je la 7.30 ptm. okazos la kongresa bala.

Sekretario: S-o H. Stay, „La Nia“, Heatherleo Road, Southbourne, Hants., Anglujo.

XII-a Belga Kongreso de Esperanto.

Namur, 20.—21. majo 1923.

La XII-a Belga Kongreso de Esperanto okazos en Namur, kaj ne en Spa, kiel erare anoncita, la 20.—21. majo 1923 (Pentekosto).

Namur, bela urbo lokita sur la riveregoj Sambre kaj Meuse, meze de plej pentrinda regiono, certe allogos ĉiujn amantojn de bela naturo. Diversaj ekskursoj estos organizataj, inter aliaj la vizito al la famkonata „Grotto de Han“.

La Organiza Komitato okupas sin pri la logado sed, ĉar Namur estas tre vizitata dum Pentekosto, ĝi insistas petas ke oni tuj rezervigu al si la necesajn ĉambrojn kiujn oni povas havi po ĉirkaŭ 5—10 frankoj kaj plis.

La kongreskarto kostas kvin frankojn, la festeno dekkvin.

Por ĉiuj informoj oni sin turnu al la alĝojn oni sendu ekskluzive al la Ĝenerala Sekretario de „Belga Ligo Esperantista“, s-o Henri Petitau, 60, Boulevard St. Liévin, Gand—Gent.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Aŭstralio.

La IV-a Kongreso de Aŭstraliaj Esperantistoj okazis Paakon en Sydney.

En Melbourne f-ino Maud Helm, aŭstralia direktorino de Internacia Romkatolika Asocio, gvidas Esp. kurson en Katedrala Halo.

Propagandistino D-ro Fred Williams el Melbourne vizitis Esperantistojn en Hobart, New Norfolk kaj en Okcidenta Viktoriana lando, kaj starigis grupon en Castlemaine (Viktorio).

Grupo aniĝintaj al Aŭstralio Esp. Asocio funkcias nun en Belgrave, Brisbane, Hobart, Melbourne, Mont Albert, Northcote, Oakleigh, Perth, Rabaul, Sandringham, Sydney, Townsville, Townsville kaj Whangarei.

Britujo.

Ĉe Londona Esp. Klubo, la 28. marto, s-o T. J. Guérin, eksprez. de Society of Engineers kaj de Franca Komercio Cambro en London, faris parolon en Esperanto pri Armaturita Betono kun lumbildoj por ilustrati la temon. Ataskultis ĉ. 120 p., inter ili konataj inĝenieroj. Multaj vizitantoj

„Jes,“ ŝi flustris kaj lin rigardis per siaj malhelaj, grandaj okuloj. Ŝi amis lin samgrade kiel iam.

Li kondukis ŝin al la fenestro kaj diris: „Vidu, Evo, ke ankaŭ urbo povas esti bela. Mi vidis tion sidante ĉe mia fenestro. La blanka neĝo falis tiel bele per grandaj flokoj sur la stratojn kaj la tegmentojn, kaj tiam mi ekpensis je vi.“

„Mi ĵus faris la saman,“ diris ŝi. „Ĉu vi povas divini, kio kondukis miajn pensojn al vi, kara Algot?“

„Ne.“

„Ĝi estis la neĝo. La unua neĝo.“

El la svelda lingvo tradukis Viktor Bonde.

Naturo.

La kukolo kaj ĝiaj sekretoj.

„Kukol', kukol', en la arbar.“ Ĝi apartenas al la plej popularaj kaj plej konataj birdoj, la kukolo, kaj ĝiaj vivo kaj farado estas ĉirkaŭtektitaj de multnombraj fabloj. Sed ankaŭ multspecaj estas la sekretoj, pro kies senvualigo la homoj klopdadas de jardekoj kaj jarcentoj, kaj ĉirkaŭ la kukolovoko kaj kukolovo amasiĝis kvazaŭ tuta literaturo. Proksimume 200 specoj de kukoloj ekzistas, sed nur la ordinara kukolo *Canorus*, granda kiel turto, cindrogriza blanka ventro kun nigretaj laŭlarĝaj ondlinioj, blankmakula vosto, okulo kaj plecto flavaj, la ino kun ruĝetaj kravatoj ĉe la kolo, troviĝas en Eŭropo kaj pri tiu ĉi estas tiuj linioj.

„Kukol', kukol' en la arbar.“ Ĝia kutima restaĵo estas la arbaro. Tie ĉi ĝi havas la taskon formiĝi la harhavajn raŭpojn, kiujn malsatas aliaj birdoj kaj pro tio arborekonomie ĝi estas ege utila birdo. Sed ĝi emas vagadi de arbo al arbo ĝis la limo de arbaro, loĝas ankaŭ en marĉejoj

interisiĝis pri Esperanto, kiuj certe ne atendis aŭdi pri skribon de la malfacila teknika temo kun perfekta fluoco en lingvo artefarita.

Ĉeĥoslovakujo.

La XIII-a Orientbohema Laborkunsido okazis en Jiĉin; la venonta laborkunsido havos lokon en Nymburk. Sekcio Plzeň 1 de Lab. Ligo Esperantista malfarmis novan kurson por 51 p. en leĝejo de „Lab. Akademio“; gvidanto k-do J. Pech.

Finlando.

Antaŭ kelkaj tagoj nur alvenis la jan.—febr. numero de „Esperanta Finnlando“, vekante ĉe ni grandan bedaŭron. „Esperanta Finnlando“, ĝis nun unu el niaj plej regulaj, plej modernaj kaj plej interesej gazetoj, nun ankaŭ devas batali kun malfacilaĵoj. La ĵus aperinta duobla numero ne estas pli ampleksa ol ĝia nun simpla numero. La revuo ne plu enhavas ilustraĵojn, la teksto — nun kompostata per linotipo — impresas malpli bone, preseraroj enestas pli multaj ol ĝis nun. En la jarraporto de Esp. Instituto de Finnlando la direktoro s-o Vilho Seitälä diras, ke la malfacilaĵoj, ĉefe dependas de mirinda reakcio postkongresa ĉe la publiko. Ŝajnas, ke la ĝisnuna favora akcepto de nia lingvo en ĉiuj rondoj kaj klasoj parte ŝanĝiĝis en malmalikecon kontraŭ ĝi. Pri la kaŭzoj de tiu stranga rezultato de nia XIV-a la raporto silentas. Ni multe bedaŭras la malfacilan situacion de niaj finnlandaj samideanoj, sed ni esperas kun ili, ke la tempoj por ilia agado pliboniĝos iom post iom. Kuragoj kaj konfidon!

La jarkunveno de Esp. Asocio de Finnlando okazis la 24. marto en Helsinko.

En Jalaskyly (Yll-Kiiminki, Manila) instruisto Martti Puitala instruas Esperanton al ĉ. 20 lernantoj en la popollernejo.

Franco.

Laŭ sciigo ricevita el Paris, la Parisa Antaŭkongreso ne okazos, pro politikaj cirkonstancoj.

Esp. Vespero, kiu okazis la 17. marto en Perpignan (ejo de l'Union Espagnole) havis grandan sukceson. 150 gesamideanoj ĉeestis. La programo konsistis el koncerito, organizita de la „Conacle“, noktimango kaj dancaĉo gismatena. — Post la sukceso ĉe la komerca Cambro la komitato propagandas ĉe la urbdomo.

La 29. marto okazis en porparolada ĉambro de la komerca revuo „Les Echos“ en Paris, antaŭ pli ol 300 personoj (lokoj mankis), sub prezido de E. Archéacon, parolado de Prof. Berthelot, membro de la Sciencia Akademio, pri Esperanto kaj Senfadena Telegrafo. La aliaj oratoroj estis: Aulard, eksprof. de Universitato Paris, Ernault-Pelleterie, konata aeroplan-konstruisto; Quérin, eksprez. de Franca Komercio Cambro en London; kaj Baudet, membro de la Komercio Cambro Paris. La Esp. gramatikon klarigis majstre G. Chavet.

Germanujo.

La 8. marto s-o postdirektoro O. Rieck parolis en Greifswald antaŭ la polistaro. Anoncis sin 36 polistoj por Esp. kurso, kiun gvidas f-ino instr. Krehl.

Hungarujo.

En Pécs, kie okazos pentekoston la nunjara landa kongreso, finiĝis 4 kursoj. Nun komenciĝis 4 kursoj por polistoj kaj detektivoj, kaj unu nova ĝenerala kurso por 25 p.

Petöfi-vespero aranĝita en la Socia Muzeo de Budapeŝt la 28. marto kunvenis 80 s-anojn. S-o Balkány laŭleĝis hungaran prologon pri Esperanto. Deklamis D-ro Kalocsay, Ellinjo Zimmermann, D-ro Lóránd kaj Alfonso Pechán. Grandan sukceson akiris per Petöfi-kantoj aktoro M. Sarossy. Pri la festeto raportis kelkaj gazetoj.

Svedujo.

Laŭ „Svenska Arbetar-Esperantisten“ Esperanto bone progresas en svedaj laboristaj rondoj:

En Göteborg-Gamlestadens k-ado Norling gvidas kurson por 16 laboristoj de fabriko Original.
Lab. grupo kun 18 membroj fondiĝis en Södertälje, 4 kursoj okazos tie.

En Bromölla kurso por 7, en Vanås por 28 anoj de Sveda Lab. Sobrega Asocio.

En Mockbyrd kurso kun 40 p. (gvid. Söderlund). En Rödeby kurso de instr. Fr. Ahnfeldt; la sama gvidas kurson por 20 p. en Karlakrona.
En Sandviken kurso por 10 p.

Poŝtmarkojn por la rusaj malsatantoj

mi ricevis de: A. Kloeck kaj N. Grynens, Amsterdam; T. Sufadina-Yelland, B. Gakowicz, Wilno; W. Bosma, Amsterdam, krome de O. de Beus, Culemborg, unu guldenon kaj de J. Goossens, Deventer, 5,50 guld. — Koran dankon! — G. P. de Bruin, Allée-weg 9, Enschede, Nederlando.

Korekto de preseraroj.

Krom diversaj malgrava, troviĝas en ET n-o 150 ankaŭ kelkaj gravaj preseraroj. Jen ilia korekto:

Pg. 2, kol. 8: en la subskribo sub la kongreskomunikado de Danzig legu Aeltermann anst. Feltermann.

Pg. 2, kol. 4, lin. 5/58: anst. Esperantisto aŭ akcidentala legu Esperantisto aŭ Okcidentalano.

Pg. 3, kol. 2, Skoltismo, al. 2, lin. 4: anst. definitajn legu difinitajn; al. 3, lin. 3: anst. esperit legu esprit.

Pg. 3, kol. 3, Geografio, lin. 8: legu km². anst. km.; al. 2: legu trifoje Tanganjika anst. Tanganjika.

kaj erikejoj kaj estis aŭdata eĉ sur senarbaraj insuloj de la norda maro. La plej populara estas la voko de l' kukolo kaj tiu ĉi eksterordinara populareco sin rimarkigas per ĝia ofta uzigo ne nur en la folkloro, sed ankaŭ en la opero. La kukolo estas la unua birdo, kiu aperas en la muzika literaturo. Neniu alia tiom instigis, imiti la gaje kaj vigle tra la arbaro sonegatan printemповокon kaj amike respondi per homa voĉo kiel sonanta eĉo al la heroldo de l' printempo. La muziko de preskaŭ ĉiuj popoloj konas la kukolmotivon kiel belan toncentraĵon kaj la grandaj komponistoj germanaj kun ilia germana „Gemüt“ (animumo) ne staras sur la lasta loko. Ekz. en la fabelopero „Hänsel und Gretel“ (Johĉjo kaj Margrenjo) de Humperdinck la kukolvoko tre riĉe estas uzita. La popolo amas eĉ la mekanikan reproduktadon de l' kukolvoko en sia hejmo per estabdo de horloĝoj, kiuj ĉiun horsonon akompanas per la kukolvoko. Ni ne konas birdon, kies voĉon ni povas imiti tiel precize voĉe kaj muzike krom la kukolo. La plej gravaj scienculoj pri birdoj klopdodis, kvazaŭ fiksi sur disko gramofona, silabigis kaj notigis la sonojn kaj tonojn de l' diversaj kantuloj. Kio el tio rezultigas, ofte estas miksaĵaĉo, kiu ne povas doni la plej etan imagaĵon de l' efektiva kanto animplena. Sed la kukolo, la ne kantbirdo en pli mallarga senco, el ĉiuj birdoj laŭtigas la plej similaj al la homa lingvo kaj homaj kanisonoj, tute similaj kiel niaj ordinaraĵ dombestoj, ekz. me, i-a, mu, vaŭvaŭ, miaŭ. Ĝenerale vastiĝinta estas la opinio, la kukolo kantas nur la malgrandan tercion, fakte ĝi kantas ankaŭ la grandan tercion kaj aŭdigas kelfoje ankaŭ la kvaron, kvinton kaj sekundon. Same malĝuste estas, ke la kukolo vokus nur du tonojn; dum la tempo de plej forta sekso ekscitigo sufiĉe ofte oni povus aŭdi tri tonojn. Krom la okazo de surpriziĝo aŭ ekscitigo la unuopaj

Intervjuo kun Prof. Gilbert Murray

ano de la Intelektika Komisiono de L. d. N.

Profesoro Gilbert Murray faris paroladon lundon vespere en Liverpool pri la Ligo de Nacioj kaj la neceso ĝin subteni por ĉiu pacamanto. Sciante ke la profesoro estas ano de la Komitato de Intelektuaj Kooperado, al kies konsidero la reprezentantoj de la Ligo de Nacioj transdonis lastan jaron la esploron de la demando pri Esperanto, mi kaptis la oportunion intervui la profesoron post la kunveno.

„Ĉu la demando de Esperanto jam venis antaŭ via komitato?“ mi demandis. „Jes,“ respondis la profesoro, „kaj la komitato simple flankmetis la aferon sen diskuto.“ Mi esprimis surprizon je tiu novaĵo, kaj la profesoro tuj klarigis ke — tio okazis antaŭ la lasta kunveno de la L. d. N. „Unu el la komitatanoj“, li diris al mi (la nomo ne estas por publikigo), faris proponon sed nenio rezultigis pro la forta kontraŭstaro de alia ano (la nomo ankaŭ devas resti sen publikigo). Kompreneble, nun,“ diris la profesoro, „ĉar la Ligo definitive kaj formale transdonis al nia komitato la demandon, ni nepre devos ĝin diskuti. La diskuto verŝajne okazos ĉe la proksima kunveno en junio aŭ julio.“

„Kaj kian rezulton oni povas atendi de la komitato?“ mi plue demandis. Tion la profesoro ne povis antaŭdiri. Li nur povis sciigi ke, almenaŭ unu el la komitatanoj, reprezentanto de sufiĉe grava membro de la Ligo, estas forta kontraŭulo al Esperanto. La sama nomo estis menciita sed ne por publikigo.

Mi volis scii, ĉu la profesoro aŭ iu alia ano de la komitato ricevis iun raporton pri aliaj mondlingvaj sistemoj, similan en ĝia graveco al tiu eldonita de la sekretario de la Ligo pri Esperanto. Mi eksciis ke ne, kvankam aliaj sistemoj alsendis literaturon kaj esprimojn de eminentuloj pri siaj mondlingvaj sistemoj. La idistoj alsendis sufiĉe gravan materialon, kaj la profesoro mem estas impresita per la fakto, ke Profesoro Jespersen subtenas la idan sistemon de filologa vidpunkto. Pro diversaj kaŭzoj tamen, li mem favoras Esperanton. Kiam la diskuto pri Esperanto venos antaŭ la komitaton proksiman fojon, la komitato tre verŝajne elektos el siaj anoj subkomitaton por plue esplori kaj studi la demandon.

Mi esprimis la esperon ke la profesoro permesos sian elekton al tiu sub-komitato, kio estos tre bona veno al tutmonda Esperantistaro.

J. D. Applebaum.

Laboristaro.

Favora rezolucio de Turnorvega Asocio de Laboristaj Sindikatoj.

La Turnorvega Asocio de Laboristaj Sindikatoj havis sian 10-an kongreson en Kristiania la 4—11. marto. Post parolado de s-o Hans Aas, red. de Norsk Bokbinder-Tidende, la kongreso akceptis sekvantajn rezoluciojn:

„La kongreso esprimas sian simpatian por la laboro pri enkonduko de la Internacia helplingvo Esperanto, konsiderante ke internacia komprenigilo estus la plej grava rimedo por evoluigi kaj forigi la solidarecon kaj kunsentecon de la laboristoj, kaj ke ĝi ankaŭ povus fari netakseblan utilon dum tiuj luktaĵoj pro libereco, antaŭ tiuj staras la laborista klaso de la mondo.

Tial la kongreso admonas la ĉefsekretariojn, la meti-asociojn kaj distrikt-organizaĵojn agi inter la laboristoj por la disvastigo de la kono pri Esperanto.

Oni ankaŭ devas provi kunsentiĝi kun eksterlandaj organizaĵoj de laboristoj pri uzado de Esperanto en la internacia korespondado, kaj ankaŭ oni devas celi la uzadon de Esperanto ĉe la estontaj internaciaj kongresoj.“

silaboj estas samlongaj kaj samforte akcentata, ĉu observinto de la kukolo konstatis, ke unufoje li aŭdis sonegatan la kukolvokon sen paŭzo 249 fojojn sinsekve. Estas rimarkinde, ke oni konas la plej bone el ĉiuj birdovoĉoj la voĉon de l' vira kukolo kaj apude apenaŭ scias, ke la kukolinoj kaj idoj ankaŭ ne estas mutaj. La kukolino ridetables kvikkvikkvit, laŭ aliaj asertoj kukikkikkik, sed la idoj kukolo krias cia, cissis, poste cik, cikcik.

Kvankam la kukolo nombriĝas al la plej popularaj birdoj kaj la popolo pli amas kaj atentigas ĝian vokon ol la plej belan birdokanton, la plej malmultaj homoj vidis kukolon en la libera naturo. Granduloj kaj malgranduloj amas la kukolvokon, sed la vokinton ili vidis aŭ neniam aŭ nur plenŝtopitan per pajlo. La kukolo ja ne posedas la kapablon sin malvidebligi (komparku la germanan frazon: „Scher" dich zum Kuckuck“, t. e. „Faru vin kukolo!“), sed le lertecon kiel sorĉisto sin kaŝi antaŭ homa observado. Duonan horon malproksima oni aŭdas la kukolon, sed kaŝiri ĝin preskaŭ ĉiam malsukcesas. Kiam oni serĉas ĝin tie, kie ĝi vokis, ĝi vokas jam moke en tute alia loko kaj ĉagrenigite kelkiu grumblos: „Prenu vin kukolo!“ Kiu volas provi ekvidi kukolon, tiu uzu eble jenan rimedon. La plej bone matene oni alproksimiĝas al vokanta kukolo eble ĝis 300 paŝoj, starigas sin sub alta forta arbo, laŭeble ĉi, kiu havas liberajn, sekajn branĉerojn kaj respondas la vokon plurfoje, sed precize, atendas ion, ĝi ĉu venas kaj vokas ree kelkfoje. Se ne jam estas tro malfrue dum sezono aŭ tago, ne daŭras longe, ĝis ĝi venegas, ekvidas laŭlarĝe sur branĉero kaj kun ion pendantaj flugiloj kaj levita, rade etendita vosto, komencas kukolumi. La vokon oni povas facile imiti per la buŝo kaj per ordinara fluto, blovante la grandan tercion fis-d.

Komerco.

La brazila komerca ŝiparo
konsistas nuntempe el 349 ŝipoj kun 469 000 tunoj, el kiuj 61% (285 000 t.) estas ŝtata propraĵo. Inter la ŝtataj ŝipoj troviĝas ankaŭ la iam germanaj ŝipoj konfiskitaj dum la milito.

Fondo de franca asocio „Komerco kaj Esperanto“

okazis la 17. marto, kun celo utiligi Esperanton por komercaj rilatoj eksterlande kaj propagandi ĝin en komercaj medioj. Adreso: 104, rue de Richelieu, Paris 2. Provizora prezidanto estas s-o Balliman, vicprez. de la Nacia Sindikato de Vitrajo-Negocistoj.

Francaj delegitoj al Venetia.

La 21. marto la Parisa Komerca Ĉambro decidis oficiale delegi s-on A. Baudet. La Inicjata Sindikato (porturisma societo) de Grenoble delegis s-on L. Agourtine.

Ĉokolado „Esperanto“.

Ĉokolad-bonbona fabriko de Akcia Soc. „Tilka“ (ĉefdirektoro s-o P. Medem) en Kaunas, Litovujo, aperigis novan specon de ĉokolado sub la nomo „Esperanto“. Sur la enmetitaj bildkartonetoj estas dulingve citita la adreso de Kaunas'a Esperantejo.

Propaganda kunsido en Budapeŝt por la Konferenco de Venetia.

Laŭ iniciativo de s-ano Balkanyi oni kunvokis la plej grandajn firmaojn de Budapeŝt kaj la Esperantistojn al konferenco por pritrakti laŭ hungara vidpunkto la signifon de la konferenco paaska en Venetia.

La 9. maro en la Socia Muzeo kunvenis pli ol kvindek homoj, precipe la Esperantaj oficistoj aŭ estroj de firmaoj, ankaŭ reprezentantoj de fervojoj kaj poŝtistoj. S-ano Stefano Nagy-Molnar, supera ministra kalkulkonstitanta prezidanto. S-ano Balkanyi detale raportis pri nuna stato de Esperanto en la komercio, pri la nuna uzo, sukceso, decidloj, proponoj. Poste kelkaj reprezentantoj parolis. S-o Karlo Juki, fervoja ĉefinspektoro, proponis pli grandan propagandon inter la gvidantaro, ĉar tiuj tute ne konas la sukcesojn de Esp. Li proponas en Venetia ankaŭ pritrakti la enkondukon de fervoja servo. La najbarŝtatoj uzas ofte fremdlingvon, ekzemple francan tiel malbone, ke oni devas resendi skribaĵojn petante novajn klarigojn. Simile parolis fervojojficisto T. Kovács L. Zimmermann en nomo de granda kooperativa firma anoncas, ke ĉe la firma estas 8 Esperantistoj. La firma proponas la uzon de Esp. S-o D-ro T. Schwarz en nomo de presejo Globus proponas Esp kiel stimolon de komercio kaj ankaŭ por ne uzi fremdajn lingvojn. S-o Stefano Roboz, kiel oficiale reprezentanto de plej granda kooperativa firma „Hungara“ anoncas, ke lia firma emas korespondi en Esp. Simile anoncas sin multaj firmaoj kaj kelkaj fabrikoj. S-o Jenő Szabó en nomo de grava vinekproduktanto: Tokaj-Hegyalla Vinekproduktanta A. S. anoncas, ke per Esp. reklamo kaj korespondado ili faris negocojn kaj li povis eksterlande per helpo de Esperantistoj paroli kun firmaoj, kies estroj ne konas lingvojn de la aliaj. La firma estos oficiale reprezentanta en Venetia. S-o B. Bayer en nomo de instruista kredikoooperativa firma parolas por Esp. D-ro A. Gieswein en nomo de la Hungarlanda Esp. Soc. rekomendas Esp. A. Marich mencias, ke tri internaciaj ligoj: de policistoj, poŝtistoj kaj fervojoj tute uzas Esp., kaj tial oficiale organo aperas en Budapeŝt. Oni devas utiligi tiun ĉi forton. S-o Balkanyi mencias al leteroj de la komercaj ĉambroj en Budapeŝt, Szeged kaj Miskolcz, laŭ kiuj tiuj apogus la enkondukon de Esp.

Fine s-o Nagi Molnár finas la diskuton, kaj oni akceptas unuvoĉe sekvantajn rezoluciojn:

„La reprezentantoj de budapeŝtaj firmaoj kaj entreprenoj ĉeestintaj la konferencojn kunvokitajn por prepari la komercan helplingvan konferencojn en Venetia konvinkigite pri la disvastigo, uzobeco kaj praktikaj avantaĝoj de la lingvo Esperanto por eksterlandaj komercaj rilatoj de la hungara komercio, opiniante dezirinde, ke pruvebla la enkonduko de tiu ĉi lingvo en la internacian komercan trafikon, petas la konferencojn en Venetia, ke ĝi faru proponon per la Popoligo al ĉiuj ŝtatoj por enkonduki Esp. en la komercajn lernejojn, en la komercan, poŝtan kaj fervojan trafikon, kaj la ĉefajn komercajn entreprenojn, instituciojn kaj firmaojn de la mondo alvoku por uzi la lingvon Esperanto.“

Fine oni decidis sendi la notarliron al la komerca ĉambro, komerca kaj instruada ministerioj, al la poŝta kaj fervoja direktoj. Samtempe estis malgranda ekspozicio pri Esperanto en la komercio. Pri la kunsido aperis bonvolaj apogantaj artikoloj en gazetoj: Magyaraság, Budapesti Hírlap, Pester Lloyd, Világ, Pestí Napló, Echo de Danube.

Kaj nun ankoraŭ la kukolovo! La kukolino ĉiutage metas kelkajn pli ol 20 ovojn kaj sciu, unu tagon post la alia, en fremdajn nestojn, speciale en tiujn de la silvio (*Sylvia sylvia*), kinerio (*Motacilla alba* aŭ flava), rubekolo (*Eri-thacus rubecula*), kaj kankantulo (*Lokustella naevia*), al kiuj ĝi lasas la kovadon kaj zorgon por la idoj, pro tio la parolturno de la kukolovo t. e. subŝovitaĵo. Pli ol du miljarojn la natursploroj serĉumigis pri tio, kiel la kukolo metas sian ovon en la fremdan neston. Ĝi ne estis rezervita al Edgardo Shance, trovi antaŭ du jaroj, kiel la kukolo fakte kondukas ĉe tio, kaj malkovri ĝian sekreton. Kvin jarojn de plej peniga observado li dediĉis al tiu ĉi afero, vivis en la kunesto de l' kukolo kaj fine venigis sian konstatojn ĝis tiel feliĉa sukceso, ke li kapablis diri kelkajn tagojn antaŭe, en kiun neston la kukolo metas la ovon kaj indiki ankaŭ la proksimuman tempon. Kaj tial li ankaŭ entreprenis fotografi sinjorinon kukolinon dum tio okupo. Do, por havi klaran rigardon por la fotilo, oni forprenis la surmetitan herbon de l' nesto de la silvio, pri kiu nesto oni devis supozi, ke la kukolino honorigos ĝin per sia vizito. Post duona horo aperis la bela birdo. Sinjorino kukolino venis ĝis kelkaj piedoj al la nesto kaj ŝajnis surprizata. Ŝi estis pli ofte inspektinta la neston dum la lastaj tagoj kaj estis trovinta ĝin bone kovrita, nun ĝi estis aperta. Ŝi ree rigardis ĝin, ŝiaj duboj kreskis kaj ŝi flugis for. Eble dek metrojn for ŝi rigardis desur sia branĉo observejo al la nesto kaj kiam ĉio restis malsuspektinda, ŝi glitis rekte en la neston. Tuj ŝi pikbate malfervis per sia beko tiun ovon de la silvio, kiu estis al ŝi plej proksima, sidigis sin en la nesto tenante ankoraŭ per la beko la ŝellitan ovon, metis sian propran ovon kaj tuj forflugis. La tuta okazaĵo de la momento de l' al-

Scienco.

Stenografio kaj Aŭtostenografio.

La stenografio fariĝas pli kaj pli kategoria neceso en la praktikado de multaj profesioj. Estas certe, ke ekzistas granda nombro da stenografaj sistemoj, kiuj estas instruataj en sen nombraj lernejoj de instruistoj, kies scio kaj fervoro estas evidentaj. Tamen oni devas konfesi, ke la pli multe de iliaj lernantoj post peniga kaj malkuraĝiga studado de proksimume ses monatoj forlasis praktikke la stenografion, kiun oni instruis al ili kun tiom da klopodo. Kial tiu videbla malsukceso de la stenografia instruo? Tute simple, ĉar tiuj stenografioj estas skribataj en speciala maniero tre malfacile deĉifrebla.

Se teorie ŝajnis necese uzi specialan skribmanieron por noti ion kun sufiĉa rapideco, tamen la praktiko pruvas kaj malfeliĉe montras, ke la uzo de tiaj grafaj rebusoj enhavas grandajn malfacilaĵojn, kaj ofte eĉ okazas, ke esencaj partoj de tio, kio estas stenografita, estas poste ne ĉifrebla. Tial de trideko da jaroj aperis diversaj sistemoj de rapida skribo, uzantaj tute simple la ordinaron skribon, tio estas: la literojn kaj signojn de la ordinara alfabeto. Tiuj sistemoj, kvankam tre primitivaj kaj tial nesufiĉaj, estas akcentitaj de sen nombraj personoj kun granda fervoro, kiuj dislevigis aŭ estis teditaj pro la studado de kriptografaj stenografioj.

Niajn legantojn certe interesos sciigi, ke nia samideano s-o Paul Rémy en Paris post funda kaj preciza studado de la demando sukcesis elpensi specon de stenografio (uzante la ordinaran skribon), kiu ebligas noti per sufiĉa rapideco kaj sen konfuzo ne nur en franca lingvo, sed ankaŭ angle, germane ktp. Ni aldonu, ke la elpensinto publikigis metodojn, kiun oni povas havigi al si de li mem, Ecole de Filles, 41 Rue de Chabrol, Paris 10, por 8.50 frankoj, kaj li estas preta doni ĉiujn informojn utilajn al tiuj, kiuj lin deziras pri la studo de lia sistemo; se la informoj estas donotaj per letero, oni aldonu poŝtmarkon por la respondo.

Blindularo.

Denove ni atentigas pri la alvoko aperinta en la antaŭa numero de ET. Mensendonitojn ni petas rimarkigi, ĉu la mono estu por „Esperanta Ligilo“ aŭ por la Blindul-Esperanta Kongreso.

Antaŭ kelkaj semajnoj blinda samideano el Essen dum mallonga stato en Freiburg (Germ.) vizitis la tean Esp. grupon, kiu kolektis 10500 mk. por ebliigi al li la vojaĝon al Nürnberg. Estus dezirinde, ke aliaj grupoj de plej diversaj landoj imitu la ekzemplon de la grupo en Freiburg. La sekretario de la Prepara Komitato por Arango de la III-a Internacia Blindul-Esperantista Kongreso, s-o Joseph Kreitz, Deschstr. 29, en Kreuzau bei Düren, Rheinland, Germ., diras al la freiburga grupo plej profundan dankon en la nomo de la blinduloj. Mondonacojn por similaĵoj oni povas sendi al li aŭ al ET.

Ĝis 20. marto alĝis 65 nevidantaj samideanoj el 10 landoj por partopreni sian III-an en Nürnberg.

Arto.

Sarah Bernhardt †

La 26. marto vespere morlis en Paris 78-jara s-ino Sarah Bernhardt, la famkonata aktorino.

Internacia Sporto.

Piedpilko.

Young Boys Bern kontraŭ T. V. Augsburg 3 : 3. — Sparta Praha facile venkis Amateure Wien per 6 : 0 (paŭzo 0 : 0).

veno ĝis tiu de la forflugo daŭris precize dek sekundojn.

Alluloj ja defendas la kukolon kontraŭ la riproĉo de intencaj ovodetruoj kaj prezentas la opinion, ke ĝi elsuĉas la ovojn de l' nutronta birdo nur tiam, kiam ĝi ilin defektas per la enŝovo de sia ovo. Ovodetruoj ankaŭ povas okazi, kiam la juna kukolo jam estas finkovita kaj la propraj ovo de la gezigantoj ne jam estas tiel maturaj. Tiam la ĉielavida kaj dikkapo zorgato kutimas preni la ĉiam donatan nutraĵon de l' gezigantoj tiel malkvietege, ke tom post ion ĝi jetas el la nesto ties malfalsajn ovojn kaj idojn. Sed klial la kukolo metas sian ovon en fremdajn nestojn, ĉu ĝi pro sola oportuno — pri loĝeja mizero ja ne povas esti parolate — ĉu pro aliaj kaŭzoj trans-lasas al aliaj birdoj la kovadon kaj nutradon, estas kiel tiom alia ne jam klarigita. Sed pro tio ni ne volas malpli ĝoli, kiam ree eksonos la kukolvoko kaj gaje anoncas la venontan printempon.

Jur. Dolf Halbedl, Graz.

Romain Rolland.

Ni posedas taŭgan tradukon de la tragedio „La tempo venos“, kiu havas kiel fundon la ekspedicion de la britoj kontraŭ la buroj en Sudafriko. Romain Rolland skribas pri la tragedio, ke li per ĝi ne volas akuzi lun unuopan nacion eŭropan, sed Eŭropon, kaj ke li dediĉas ĝin al la civilizacio. Ni intencas publikigi la tragedion en ET, sed antaŭe ni deziras scii, ĉu niaj britaj legantoj estos sufiĉe tolerantaj por ne ofendi.

Samtempe ni petas la tradukinton, s-on J. Mader, sciigi al ni sian nunan adreson.

Virinaro.

Kion ni faros?

Kiel paciŝtato, kiel ano de la Zamenhofa ideo, mi kunlaboras kun kelkaj nederlandaj virinoj, kiuj volas vekti la interesigon de l' virinoj en ĉiuj landoj por la nuntempaj suferoj de Eŭropo. Mi ne estas por iu difinita nacio, sed por homaranismo. Ne diru: Ni tamen ne povas plibonigi ion; ni ne povas ŝanĝi la mondon. Sed firme kedu kaj sciu, ke ni povas! Sciu, ke la pensoj de l' homoj multe efikas! Se ni nenion faras, ni estas kunkulpaj.

Kion respondi al niaj infanoj, se ili poste demandas: Sed kion vi faris por helpi la homaron? Ni havas la devon kune labori, por ke iam venu vera paco, nova mondo, — mondo, en kiu niaj infanoj povos esti feliĉaj. Nun vi tuj povas fari ion tre simplan. La komitato tie ĉi (ne-Esperantistoj) bezonas milojn da subsidaj de aprofantoj por plia laboro.

Tuj sendu la vian, montrante vian simpatian:

Julia Isbrucker
v. Beverningkstr. 10
Haag, Hollando.

Gazetaro.

Hungaraj gazetoj.

De 20. januaro ĝis fino de februaro aperis multaj artikoloj pri aŭ per Esperanto en sekv gazetoj: L'Echo de Danube, Az Újlet, Világ, Nép, Szózat, Pestí Napló, Magyaraság, Pester Lloyd, ĉiuj en Budapeŝt; Pécsi Lapok en Pécs; Miskolci Napló en Miskolc; Vasvármegye kaj Nyugat-magyarország en Szombahely; Közgazdaság en Szeged. La artikoloj temas pri la konferenco en Venetia, kongreso de Nürnberg, folioj de Barcelona, Leipzig, Helsinki, Lit. Mondo, Baghy-Revuo de ET, ktp.

Allilandaj gazetoj.

Diario de Notícias, Lisboa, 10. 3. Pri Venetia. Proletario de Ligo, Moskva, n-o 2. Listo de la enhavo ankaŭ en Esperanto. The Architects' Journal, 21. 2. Represia el ET konkursa de ŝtata teknika lernejo en Tallinn. L'Indépendant des Pyrénées-Orientales, Perpignan, 19. 3. Pri vesperarto de la Esp. grupo. République de l'Oise, Beauvais, 9. 3. En ĉefartikolo pri franca propagando la aŭtoro varme rekomendas la uzon de Esp. Quotidien, Paris, 15. 3. „Lingvo internacia estas necesa por la progreso de la homaro“, favora ĉefari. de konata psikiatrio D-ro Toulouse. Reichenberger Zeitung, 15. 3. Pri ŝtata Esp. ekzameno. — 22. 3. Kongreso Nürnberg. Déva és Vidéke, Deva, Rum, 10. 3. Prop. art. Temesvarer Zeitung, Timiŝoara, 8. 3. — Dimineata, Bucureŝti, 11. 3. — Infraterra, Cluj, n-o 745. — Keletl Ujság, Cluj, 8. 3. — Pri Esp. tago en Timiŝoara. Norsk Bokbinder-Tidende, Kristiania, 15. 3. Letero de la red. en Esp. L'Ecole Emancipée, Saumur (Franc.), 24. 3. Art. pri Röntgen, trad. el ET de M. Bouhour. L'Est Républicain kaj L'Impartial de l'Est en Nancy enhavis notojn pri Venetia. — L'Est Républicain de 28. 3. represia art. pri la sekretoj de Egipto, laŭ ET. La France du Sud-Ouest, 26. 3. Pri Venetia. Journal d'Alsace-Lorraine, Strasbourg, 28. 3. Represo de la leteroj de gen. Seberty. Journal du Loiret, Orléans, 16. 3. Art. de Guérille laŭ „France-Esperanto“. Der Abend, Wien, 22. 3. Kritiko je bankdirektoro Spitalaky pro rifuzo de disponebla ĉambro en banko por Esp. kurso, kiun volis partopreni 21 oficistoj de la banko. Die Rote Fahne, Wien, 27. 3. Tri art. pri Esp. kaj mond-lingvo. Schlesische Bergwacht, Waldenburg, 24. 3. Art. kaj anoncoj pri Esp. — 26. 3. Grande anonco pri Esp.

Afalia letereto.

(Traduko el germana lingvo.)

Al s-o Teo lung en Köln-Horrem. Esperanto gazeto, kies eldonanto aplikas tian kaj mensogajn principojn, estas kondamnita je morto. — La tre sana kaj vera Esperanto-afero havas nenian domegon pro tio.

Praust, la 10. 3. 1923. *Max Amort.*
10. 3. 23. 40. Al.
(La cifero 40 signifas, ke li faris 40 kopiojn de tiu afalia letereto; Al. alne signifas Amort.)

Kiel komenton oni legu la artikolon „La muŝo“ en ET n-o 126, la du lastajn alineojn de la ĉefartikolo en la marta „Revuo“ kaj la artikolon „Mi devas protesti“ en hodiaŭa numero.

Por Kongresantoj.

A.: Ĉu vi aŭdas, ke la XV-a internacia Esperanto-Kongreso okazos en Nürnberg? Ĉu vi ĝin vizitos?
B.: Mi akias, sed mi ne kuragos la partoprenon, mi ne sufiĉe bone parolas Esperanton.
A.: Kia ideo! Vi ja parolas!
B.: Nu, jes, sed nur jene, kaj ĉiam mankas al mi la vortoj.

A.: Por tio mi akies helpon. Mi akias, vi estas tre okupata, tamen ĉiutage dum la dua matenmanĝo vi havas kelkajn minutojn da libera tempo. Dum tiuj ĉi minutoj lernu 20 novaĵoj, ankoraŭ nekonatajn vortojn el via vortareto, kaj post mallonga tempo vi flue parolos.
B.: Dankon, mi provas.

A.: Nu, ĉu vi diligente lernas Esperantajn vortojn?
B.: Certes, kaj estas por mi vera plezuro, tamen mi ĉiam ankoraŭ timas.

A.: Kial do? Vi estas tro timema. Kuragou! Antaŭe!
B.: Mi ne sen kaŭzo estas timema. Mi aŭdas, ke en Nürnberg la policanoj estas bonaj Esperantistoj. Oni ordonis al ili, ke ili observu la kongresantojn, aŭdante malĝustajn vortojn, balbutadon aŭ naciajn lingvojn, ili devas postuli punpagon: markojn, frankejojn, guldinojn aŭ kronojn. Ĉi tio estas al mi tre malagrabla.
A.: Ĉu vere? Mi tion ne povas kredi.

A.: Via scigo pri la policanoj estas grava eraro. Certes ili diligente lernas Esperanton, sed punpago ne ekzistas. Male, oni ricevas en Nürnberg premiojn por bona elparolado, flua konversacio kaj lerta diskutado.
B.: Premiojn? Kiom alioge! Mi tion tre ŝatas. Se mi gajnos premiojn, miaj gekungrupanoj estos fieraj pri mi, eble mi ricevos valoron libron aŭ iun gazetabonon. Mi lernados, mi lros, mi venkos!

A.: Bravo! Al kuraĝulo la mondo apartenas.

Marie Hankel.

Libro-aĉetantoj atentu!

Lastmomente ni ricevis sciigon de la firma Butin & Jung en Godesberg, ke la ŝlosilnombro nun estas 2500; do la prezoj por malbonvalutuloj sciigitaj en la hodiaŭa numero, altiĝas je 25%.

